

64-a jaro n-ro 184 2023:6

**la** lampiro



**La adiaño  
de karisma enlandano**

# Quer aprender Esperanto?

**PROGRAMO  
MIA AMIKO**



**[pma.esperanto.org.br](http://pma.esperanto.org.br)**

# Enhavo

- 4 | **Kino kaj aliaj artoj**  
Thelma Johnson Streat
- 6 | **Forpaso**  
Kiel eblas pensi pri la brazila  
E-movado sen Amarílio Carvalho?
- 7 | **Ekskurse**  
Emociiga vizito
- 8 | **El nia historio**  
La Universala Fratereco
- 10 | **Fabele**  
La pentuvio kaj la suno
- 12 | **Literature**  
La viro, kiu kalkuladis, verkadis  
kaj instruadis: Malba Tahan
- 16 | **Mia korto, mia sorto**  
Interveno 1 - Forcejo
- 19 | **Iom da scienco**  
artefarita Inteljekto: mitoj kaj faktoj
- 22 | **Iom da gramatiko**  
Lingvaj Respondoj
- 23 | **Lingva angulo**  
Aktivaj kaj pasivaj lingvoj
- 24 | **Recenze**  
Eseo memore al Ivo Lapenna
- 26 | **Movade**  
Bonvenon al la 57a kongreso de ILEI
- 28 | **El mia ĉiutaga vivo**  
A 3
- 29 | **El mia vidpunkto**  
Ĉu vi estas esperantisto?

la lampiro

64-a jaro n-ro 184 2023:6

## Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sergio Viana  
(psviana@terra.com.br)

**Enpaĝigo:** José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas  
pri la subskribitaj artikoloj*



## Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

### Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca  
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo  
easp.org.br | contato@easp.org.br

### Estraro

**Prezidanto:** Esmeraldo A. Alencar de Lima  
**Vicprezidantino:** Cristina de Claudia Graaf  
**Sekretariino:** Maria Conceição Rodrigues  
**Kasisto:** José R. Tenorio da Silvas

### Konsilantaro

Paulo Sergio Viana  
José Mauro Progiante

### Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

## Jarkotizo por 2024

Simple Membro .....	R\$ 200,00
Subtena Membro .....	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro .....	R\$ 100,00

# Thelma Johnson Streat

Esplorante pri kiu artistino mi prezentu al vi ĉi foje, mi trovis Thelma Johnson Streat. Mi povus fari pri alia, sed mi pensas ke vi ankaŭ ĝuos koni pri ŝiaj vivo kaj arto.

Thelma estis edukistino, artistino kaj dancistino kiu havas devenon afrikan, usonan kaj parte indiĝenan (Cherokee).

Filino de la artisto James Johnson kaj Gertrude, ŝi naskiĝis en la 29-a de aŭgusto 1911 en Yakima, malgranda urbeto en ŝtato de Vaŝingtono. Kiam ŝi estis juna, ŝia familio translokiĝis al Portland, urbo en la ŝtato Oregon. Kaj en 1932, Thelma gradiĝis en “Washington High School”.

Ekde kiam ŝi estis sep-jaraĝa ŝi desegnis kaj poste studis arton en “Museum Art School” (kiu nun estas “Pacific Northwest College of Art) de Portland en 1934 kaj 1935.



Thelma Johnson Streat

kaj poste ŝi plu studis en la Universitato de Oregon en 1935 kaj 1936.



Kuniklo-viro, 1941

Pasis apenaŭ jaro de ŝia diplomiĝo, kaj ŝi jam faris ekspozicion! De tiam sekvis multaj aliaj en pluraj lokoj. Ŝiaj verkoj volis atentigi pri la kulturo de la nigrujoj en Usono kaj ĝia



graveco por la usona historio. Fine, ŝi kreis edukian serion de pentraĵoj kiu nomiĝis “La nigruloj en la Historio”, kiu eĉ entenis pentraĵon de kontribuoj de nigraj virinoj.

Ŝia plej fama pentraĵo estas “The rabbit man” aŭ la kunikla viro. Tiu pentraĵo estis aĉetita de Alfred Bar por la muzeo MoMa en 1942. Tiam ŝi iĝis la unua nigra virino kiu havis pentraĵon en ilia porĉiama kolekto. Tio iĝis nur unu inter ŝiaj profesiaj kaj personaj atingoj dum la vivo.

Kiel dancistino, ŝi alportis folklorajn dancojn ĉefe el Haitio sed ankaŭ el aliaj lokoj de la mondo. Ŝi pensis ke tio estas tre bona ilo por ŝanĝoj de sociaj normoj. Kun tia celo en la menso, ŝi

gvidis tiajn atelierojn por konigi belcon kaj valoron de ĉiu kulturo.

Dum iom pli ol dek jaroj Thelma estis edziniĝinta al Romaine Virgil Streat, kaj eĉ post eksedziĝo ŝi ade uzis lian nomon. Kelkajn jarojn poste ŝi edziniĝis al sia manaĝero John Edgard Kline. Ŝi forpasis en la 21-a de majo 1959 en Los Angeles, California.

Mi esperas ke vi ĝuis koni ŝin, ŝian vivon kaj verkojn tiom kiom mi. Mi pensas ke tiaj historioj povas profunde nin inspiri. Se vi estas artema, kiel mi, prenu tempon por esplori pli pri ŝiaj belaj kaj koloraj verkoj kaj vivhistorio! Ĝis la sekva fojo!

**Anna Lobo de Carvalho**



La nigrulo en metia vivo (mura studaĵo montranta virinojn en laborejo), 1945

# Kiel eblas pensi pri la brazila E-Movado sen Amarílio Carvalho?

En la monato novembro 2023, okaze de Tutamerika Kongreso de Esperanto, en la urbo Fortaleza, en la brazila ŝtato Cearao, forpasis unu el la plej amataj, popularaj, karismaj kaj eksterordinaraj figuroj en nia landa movado. Cetere konata ankaŭ en aliaj landoj.

Amarílio havis sian propran manieron ami kaj uzi Esperanton. En sia ekstrema idealismo, li vivis en Esperanta dimensio. Kiam li estis juna, li adoris la faman “Junulkurson”, kiun tutmonde diskonigis Sennacieca Asocio Tutmonda. Amason da kursoj li gvidis laŭ tiu metodo, dum multaj jaroj. Li simple taksis la metodon “perfekta”.

Poste li komencis produkti ĉemizojn, por “propagandi” nian lingvon. Liaj ĉemizoj estis buntaj, plenaj de steloj kaj devizoj, detale desegnitaj kaj foje kun moralisma enhavo. Sed oni ne povus imagi brazilan Esperantiston, kiu ne havas almenaŭ unu ekzempleron. Ĝi kostis nur la “prezon de banano”.

Dum siaj lastaj jaroj, Amarílio enamiĝis al la brazila heroo “Tiradentes”. Li opiniis lin iaspeca revoluciulo-sanktulo-martiro, kaj li nepre volis ligi tiun legendecan figuron al Esperanto. Li do verkis monologon, kaj mendis de ĝi Esperantan tradukon. Kaj li obstine, konstante, senlace prezentis la teatraĵon en multaj urboj brazilaj kaj eksterlandaj. Sendepende de la radikala montrado de la martiro, estis mirinde, kiel la jam ne juna Amarílio sukcesis flue elparoli la tutan dramon dum unu tuta horo, sur la podioj. Laŭ sia informo, li prezentis ĝin proksimume cent fojojn!

Ni brazilanoj estas orfoj. Jam ne staras inter ni la homo kun blanka barbo kaj strangetaj manieroj, kun bona koro kaj speciala maniero ami Esperanton. “Paĉjo Noel” ne plu elridos sian basan ridon.

Kiel eblas pensi, ke li jam ne estas inter ni?!...

**Paulo S. Viana**

## Emociiga vizito

Je la 25-a de novembro 2023, grupo da Esperantistoj el la Ŝtato San Paŭlo faris emociigan viziton al eminenta veterano. Ili decidis pasigi unu horon en la ripozejo por maljunuloj, en la ĉefurbo, kie nuntempe loĝas grava brazila Esperantisto Oswaldo Pires de Holanda. Organizis la ekskurseton kaj fiksis la vivitohoron la aktiva EASP-ano Carlos Jorge Rodrigues. Afable akceptis la grupon la oficistoj en la institucio, kaj baldaŭ oni venigis nian karan samideanon sur rulseĝo.

Holanda estas nuntempe 102-jara, kaj jam ne povas piediri. Tamen li re-konis plurajn vizitantojn kaj diris iliajn nomojn. Kvankan li estas malforta, li trafte respondis al niaj demandoj en bona Esperanto. Kaj eĉ deklamis poe-mojn. Lia amata edzino Delza konstante staras apud li kaj entuziasme salutis la Esperantistojn.

Oswaldo Pires de Holanda estas eminenta Esperantisto. Dum multaj jaroj li aktivis por nia movado en Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP) kaj en Esperanta Klubo Zamenhof (EKZ), en la nordorienta parto de la urbo San-Paŭlo. Li estis ankaŭ prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (BEL).

Vere eminenta veterano, kiu meritas ĉies respekton kaj admiron.

**Paulo S. Viana**



Holanda sidanta sur rulseĝo kaj dekstre lia edzino Delza

# La Universala Frateco

J. B. de Mello e Souza (1888-1969), frato de Malba Tahan, estis unu el la malmultaj brazilanoj, kiuj persone konatiĝis kun Zamenhof.

Dudekdujara kaj sekretario de Brazila Ligo Esperantista (nun: BEL), João Baptista partoprenis i.a. la 6-an Universalan Kongreson de Esperanto en Vaŝingtono, Usono (1910). Tie li renkontis Zamenhof kaj ricevis arĝentan medalon kiel premion de la Literatura Konkurso de tiu kongreso, pro la jena poemo:



João Baptista de Mello e Souza

## LA UNIVERSALA FRATECO

Sur ondegaj malpacemaj,  
De profunda, nigra mar'  
En ŝipet' iras sentime,  
Plej kuraĝa maristar',  
Estas tero malproksima,  
Ocean' montriĝas nur',

Sur akvaro la senlima  
Ne briletas ja lumtur'.  
  
Kaj la nokt' estas malhela,  
Sed ŝipet' antaŭen iras,  
Sub ĉielarkaĵ' senstela.



Kion serĉas vi, ŝipistoj,  
Tra dezerta l' ocean'?  
Ĉu la morton vi ne timas  
Pro koler' de l' uragan'?  
Kien iras, ho bravuloj,  
Kion, fratoj, celas vi?  
Nur riferoj, ne insuloj,  
Ja troviĝas tie ĉi:  
  
Kaj de l' vento forpuŝata  
La ŝipet' antaŭen iras  
Sur akvaro la malglata...

“Niajn hejmojn forlasinte  
“Ni foriris el Patruj’  
“Al haveno ni vojaĝas;  
“Ĝi aperos, certe, tuj’, . .  
“Ke ĉiel’ bela fariĝos,  
“Ke ne estos plu danĝer’,  
“Ke la maro trankviliĝos,  
“Nin certigas la esper’. . ”

Ventoj ĉesas... En ĉielo,  
Inter nuboj, tremetante,  
Ekbriletas luma stelo . . .

Al ŝipistoj nun similaj,  
Ni laboras kun fervor’,  
Ĉiujn barojn ni faligos  
Nur kun amo en la kor’;  
La Espero nin protektas,  
Dum vojaĝo regas ĝoj’.  
Verda Stelo nin direktas  
Tra la tuta longa voj’ . . .

Ni daŭrigu, kolegaro,  
Ni laboru kuncelante,  
La FRATECON DE L’ HOMARO.

Ĉerpita el "Amerika Esperantisto"  
vol. 8, n-ro 6 (Januaro 1911), p.144  
– alirebla ĉe [https://archive.org/details/AmerikaEsperantisto\\_1911\\_v08\\_n06\\_jan/page/144/mode/2up](https://archive.org/details/AmerikaEsperantisto_1911_v08_n06_jan/page/144/mode/2up)

**James R. Piton**

## La pentuvio kaj la suno

Oni rakontas, ke pentuvio<sup>(\*)</sup> kaj la suno estas eternaj enamiĝantoj. Kiam frumatenas la birdo vekiĝas tute silente, malfermas unu okuleton, poste la alian, rigardas flanken certigante, ke ĝi estas la unua vekiĝinta; etendas unu piedeton, poste la alian, frotas la akran bekon sur la arban branĉeton. Atente, kun siaj nigraj okuletoj, rigardas la tutan horizonton por vidi kie la suno ekaperos:

— Ĉi tie estas mallume, tie ankaŭ, pli dekstre iomete pli lume. Rigardu, vere estos tie, ĉar la horizonto jam flavetas, ĝi ekaperos tie.

La pala kaj pigra suno, iomete dormema, ekaperas ĉe la horizonto disĵetante la unuan radieton; ĝi gvatas, gvatas ankoraŭfoje kaj vidas nenion; kompreneble la suno ne

trovos sian amatan birdon, ĉar ĉiunokte la lerta pentuvio serĉas malsaman dormejon por ne esti malkovrita.

Ankoraŭ timida, sed jam oranĝkoloreta, la suno kun pliaj eksteraj radietoj subite aŭdas gajan kanton de iu, kiu antaŭlonge ne estis trovita: pentu-vi! pentu-vi! Denove estas la birdo, kiu unue trovas la sunon. Estas tiel, kiel ili ŝatas ludi.

Jam pli vekiĝinta, la suno avide esploras ĉiun peceton de la ĉielo, serĉante la lertan birdon, kompreneble. Ĝi iras super la domo de furnario, de pasera nesto, de la kaŝejo de hirundo kaj trovas neniun. Je la horo, kiam la infanaro revenas el la lernejo, unu el ĝiaj radietoj, tre mallarĝa, deflankiĝas de unu branĉo, ankaŭ de alia, petas permeson al kelkaj folioj kaj finfine trovas iun, kiu multege plaĉas al ĝi, jam sidantan sur tre kaŝita branĉeto, kun preskaŭ fermitaj okuletoj.

La reĝa suno, preskaŭ nerimarkite kaj kun granda tenereco, rigardas,



rigardas denove kaj “kovras” la dorson de pentuvio per milda malluma plum-aĵo kaj daŭrigas sian kuradon tra la tuta ĉielo. Ĉiumatene okazas kaŝludo en la ĉielo.

Oni rakontas, sed tio ankoraŭ estas sekreto, ke la ora-flava koloro, kiu

beligas la bruston de pentuvio, estis donaco farita de la suno, okaze de la unua datreveno de ilia enamiĝo.

**Gilberto Menegasso**



Pasero



Furnario



Hirundo

(\*) Pentuvio estas onomatopea esperantigo por la nomo de la birdo pitanguso, sulfur-pitango, aŭ simple pitango (*Pitangus sulphuratus*), konata de brazilanoj kiel "Bem-te-vi". Laŭdire, ĝi estas malkonvena birdo, ĉar ĉiam, kiam oni estas faranta kaŝitan aferon, tiam aperas pentuvio kantanta: pentu-vi'!

# La viro, kiu kalkuladis, verkadis kaj instruadis: Malba Tahan

Ali Yezid Malba Tahan, aŭ Ali Yezid Izz-edin Ibn-Salim Malba Tahan, aŭ simple **Malba Tahan** naskiĝis en la vilaĝo Muzzalit, proksime de Mekko (nuna Saudarabio), en 1885, kaj studis en Kairo kaj Istanbulo. Ricevinte heredaĵon de la patro, li travojaĝis la mondon, ĉefe en Orientazio: Ĉinion, Japanion, Rusion kaj Baraton. Malba Tahan eĉ en Brazilo loĝis kaj li mortis juna, en 1921.

Aŭtoro tre produktema, Malba Tahan multe verkis kaj publikigis. Lia verkolingvo estis la araba sed danke al tradukisto egale produktema, Breno Alencar Bianco, lia verkaro fariĝis alirebla al brazilanoj jam en la 1920-aj jaroj. Multaj el liaj libroj superis dekon da reeldonoj.

Malba Tahan cetere verkis entute pli ol cent librojn, inter kiuj librojn pri Astronomio, pri Matematiko, pri Didaktiko por matematikaj instruistoj kaj pri la arto rakonti, inter aliaj.



Júlio César de Mello e Souza

Kelkaj el liaj libroj portis al brazilanoj la ĉarmon kaj misterojn de la araba kaj la persa kulturoj. Tiun etoson jam eksplicite rivelas la titoloj mem, kiel ekzemple "Minha vida querida : : os segredos da alma feminina nas lendas do Oriente" (Mia kara vivo : : la sekretoj de la virina animo en la legendoj de Oriento), "Mil histórias sem



fim... : : contos orientais" (Mil senfinaj historioj... : : orientaj rakontoj), Aventuras do rei Baribé : : romance oriental (Aventuroj de Reĝo Baribeo : : orienta romano) kaj "Maktub! : : estava escrito" (Maktub! : : estis skribite). Ĉiuj ĉi ekzemploj aperis ĉe Eldonejo Conquista.

### **Kiu estis Malba Tahan?**

Bone, tiu iom longa, kvaralinea enkonduko havas problemon: en ĝi estas malveraĵoj. Nu, la libroj menciitaj, jes, ili ekzistas, estas diverstemaj. Tamen nek Malba Tahan, nek lia tradukisto Breno Alencar efektive ekzistis. Aŭ pli precize dirite: ambaŭ kunekzistis kiel pseŭdonimoj de la brazila matematika instruisto kaj verkisto **Júlio César de Mello e Souza**.

Júlio César naskiĝis en 1895 en la urbeto Queluz, ŝtato San-Paŭlo. Filo de geinstruistoj, li iris al Rio por la studoj. En 1912 li sukcesis laboron kiel helpanto en la Nacia Biblioteko. Li sentis la privilegion esti ĉirkaŭata de miloj da libroj. En 1913 li diplomigis pri didaktiko kaj inĝenierarto. Li tiam komencis la longan karieron kiel instruisto en diversaj lernejoj, ankaŭ en Lernejo Pedro II, en la Poinstruista Lernejo de Universitato de Brazilo kaj en la Nacia Fakultato pri Edukado. Li instruis Fizikon sed poste li elektis Matematikon, kvankam li siatempe estis malbona

lernanto en tiu fako. Li diris, ke kulpis pri tio la malbona instrumentodo.

Li pioniris en la enkonduko de ludoj dum la klasoj por instrui Matematikon, kaj tiuj estis amuzaj kaj viglaj. Lia sukceso kaŭzis, ke li estis invitita al prelegoj pri siaj didaktikaj rimedoj, en Brazilo kaj eksterlande. Oni kalkulas, ke li prelegis 2 mil fojojn.

Sen ajna familia ligo kun la araba/persa mondoparto, kiel matematikisto li estis tamen tre allogita de tiuj kulturoj. Araboj donis al la mondo tre multajn matematikistojn kaj kontribuojn al Matematiko, inter aliaj sciencoj. Ne hazarde en niaj lingvoj (kaj en Esperanto) troviĝas pluraj arabdevenaj matematikaj vortoj, kiel "cifero", "algarismo", "algebro", "algoritmo" k.m.a.

Li provis kontribui per rakontoj al ĵurnalo sed li baldaŭ komprenis, ke nur per pseŭdonimo tio funkcios. Inter la jaroj 1918 kaj 1925 studis elementojn de la araba kulturo kaj alprenis la faman pseŭdonimon, ĉar ĵurnalisto avertis lin, ke ne estus kredeblaj orientaj rakontoj prezentataj de verkisto kun portugala nomo. Li elektis pseŭdonimon, kiu konsistas el la familia nomo de unu el liaj lernantinoj, de arabdevena familio (Tahan, kiu laŭ ŝi signifas "mueliston") kaj de vilaĝo en la sudo de Saudarabio.

Li publikigis pli ol 110 titolojn inter 1925 kaj 1974, kun multaj titoloj abunde eldonitaj kaj reldonitaj. En 1938 aperis lia plej sukcesa libro, "La Viro, kiu Kalkuladis". En mezorienta lando, oni konatiĝas kun viro tre lerta kaj rapida pri kalkulado. En ĉiu el la 35 ĉapitroj oni ekscias pri iu interesa praktika matematika kaj logika problemo, kiun Beremiz Samir, la viro, kiu kalkuladis, solvas kaj didaktike klarigas. La frandinda libro estis tradukita al pluraj lingvoj – franca, angla, hispana, rusa k.a. En 2021, tiu libro atingis sian 100-an eldonon en la portugala!

### Esperanto en la familio

Ni brazilaj esperantistoj estas ne-rekte sed kore ligitaj al Júlio César, tra lia sep jarojn pli aĝa frato **João Baptista de Mello e Souza** (1888-1969), fervora esperantisto. Juna João Baptista diplomiĝis pri Juro kaj estis oratoro, verkisto, poeto kaj tradukanto de brazilaj poeziaĵoj en Esperanto, krom aktiva disvastiganto. Ekde 1909 li estis en la estraro de Brazila Esperanto-Ligo kaj dum iom da tempo redaktoro de la revuo "Brazila Esperantisto"

Samtempulo de lia studenta fazo priskribis nian samideanon tiel "junulo je simplaj kutimoj, prudenta, kun ioma provinca silentemo, li ŝatis paroli ĉefe




La kovrilo de la eldonjaro 1938

pri historiaj kaj literaturaj temoj. Kun bona fiziko, tiu brunulo havis nature bonan sintenon"

Li partoprenis en aŭgusto 1910 la 6-an Universalan Kongreson de Esperanto en Vaŝingtono (Usono). Tiam li konatiĝis kun D-ro Zamenhof, unu el la malmultaj brazilanoj, kiuj havis tiun okazon. Premiigis lia poezio "La Universala Frateco" en la 2-a Kongresa Literatura Konkurso kaj li ricevis arĝentan medalon.

Dum 20 jaroj li laboris en la Ministerio pri Justico kaj danke al lia instigo la brazila registaro oficiale reprezentigis en kongresoj de Esperanto. Li



La kovrilo de 100-a memoreldono

poste fariĝis instruisto kaj profesoro i.a. pri Historio de Ameriko kaj pri la portugala lingvo. Li estris faman Colégio Pedro II (suda sekcio), fondis propran privatan lernejon, estis skoltestro kaj verkis diversajn librojn, i.a. porinfanan. Inter multaj aliaj libroj, lia libro pri la propra infanaĝo "Os Meninos de Queluz :: Crônicas de Saudade" (La Knaboj el Queluz :: Resopira Kroniko), de 1949, ricevis la premion "Joaquim Nabuco" de la Brazilia Beletra Akademio. En tiu libro li

rakontas la kontakton kun arto kaj kulturo, kiun liaj gepatroj ebligis al siaj infanoj.

### Epiloge

Revene al Malba Tahan, kiel atentigis d-ro Paŭlo Sérgio Viana, estas nekredeble, ke tiu homo, kun bela kaj rafinita stilo, kun tiom da libroj plurfoje reldonitaj tra la jardekoj, produktitaj de faka kaj kultura esplorado, neniam estis proponita por dumviva membreco en la Brazilia Beletra Akademio. Li kiel tute simpla homo ne serĉis tiajn honorojn, se oni proponis al li.

La 6-a de Majo, lia naskotago, fariĝis en Rio de Janeiro oficiala Tago de la Matematikisto.

Antaŭ ol morti 79-jaraĝa pro koratako en 1974, Malba Tahan skribis leteron al la edzino dirante, ke li volas entombiĝon en triaranga ĉerko, sen florkronoj, sen pastroj, sen mesoj, sen funebro aŭ diskursoj. Sufiĉis la multaj fruktoj (kaj semoj), kiujn li postlasis.

Ĉu ne estas bela okazo por ekhavi en Esperanto specimenojn de lia verkaro, omaĝe al la 50-jariĝo de lia forpaso en 2024?

**James R. Piton**



# Interveno 1 - Forcejo

Estas dirite ke onia korto estas aparta mondo. Kutimiĝinta ĉiam loĝi en domoj kun eta korto, nur antaŭ ĉirkaŭ unu jaro, okaze de nia transloĝiĝo al nova urbo, mi povis eksperti la tutan forton de tiu diraĵo.

Nia nova domo, situanta en montara regiono, havas grandan korton kaj krome estas ĉirkaŭita de arboj kaj verdaĵo. Kiam ni alvenis, la korto aspektis iom malzorgata kvazaŭ de monatoj oni ne purigus ĝin. Post intensa flegado, la falĉita herbejo lasis nin bone vidi ĝian grandon kaj apartaĵojn. El



Antaŭao de la forcejo kun elstare terena deklivo.

Ĉiuj detaloj de la tereno unu tuj elsaltis al la okuloj, nome ĝia deklivo.

Unu el niaj planitaj intervenoj en la nova korto estis konstrui forcejon kun kelkaj legombedoj por hejma uzado. Malgraŭ la terena deklivo, mi ne rezignis. Post kelkaj esploroj en la interreto, mi kolektis utilajn informojn por mem konstrui ĝin. Mi provis kiel eble uzi materialojn trovitajn en la ĉirkaŭaĵo: bambuo, dehakitaj trunkoj de arboj, arbara (organika) tero kaj aliaj.

La forcejo estas ĉirkaŭ 4 metrojn alta, je la pinto de la volbo, kaj okupas areon je nur 20 m<sup>2</sup>. Interne ses ter-



Grunda bazo de la forcejo mezuranta 20m<sup>2</sup> kaj fosita laŭ terŝtupoj.



ŝtupoj helpas al homa cirkulado supren kaj malsupren sur la deklivaĵo. Ĝi estas provizita per sep altbedoj el lignoj (entute 11m<sup>2</sup>), du etaj sembedoj kaj labortablo.

Ĉar en la ĉirkaŭaĵo estas neniu natura akvofonto, necesis iom improvizi por garantii akvo-rezervon por la ĉiutaga akvumado. Tiucele estis instalita hejma sistemo por kolektado de pluvakvo, kiu bone funkcias ĝis nun.

La starigo de la forcejo ne estis entute malfacila, sed nur laboriga, ĝi postulis paciencon kaj iom da lerteco pri manlaboroj. La plej defia parto estis kaj daŭre estas spertiĝi pri nova okupo tre malsama ol miaj kutimaj laboroj pri libraferoj, nome kultivado de organikaj legomoj kaj vegetaĵoj. La vojo al spertiĝo – eĉ se nur hobicela – estas longa, sed valoras la peno precipe se al la spertiĝanto plaĉas la



Detalo de la tegmenta strukturo el bambuo



La defio estis kunligi la ligno-stakojn ne per najlo sed per ŝnuro



Strukturo fortika kaj malpeza danke al la flekseblo de fenditaj bambuoj

ĉiutaga kontakto kun la tero kaj naturo.

Post pretigo de la forcejo, venis la momento pleniĝi per tero kaj sterkaĵo la bedojn por gastigi la unuajn plantidojn: laktukon, folibeton, erukon, akvo-kreson, sinapon, petroselon,


koriandron, brasikon, ŝenoprazon, cikorion, poreon, tomaton k.a..

Tiu interveno ŝanĝis ne nur la aspekton de nia nova korto sed komencas ŝanĝi ankaŭ la aspekton de niaj pladoj. Pri aliaj intervenoj en nia korto mi skribos en sekvaj artikoloj.

**José R. Tenório**



Malantaŭa vidaĵo de la forcejo



Detalo de akvoprovizo per tubo



Interne: altbedoj el lignoj flanke kaj labortabla meze



Sinapoj rapide kreskas




# Artefarita Intelektio: mito kaj faktoj

Intelektio estas, laŭ la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, “kapablo pensi konceptaĵojn kaj estigi rilatojn inter ili”. Kaj en la sama fonto oni trovas la jenan difinon pri kio estas artefarita intelekto, mallongigite AI: “komputika fako pri perkomputilaj rezonado kaj lernado.”

La celo de artefarita intelekto estas iel imiti la homan intelekton, ebligi, ke maŝinoj – komputiloj, saĝtelefonoj, robotoj, industriaj kaj hejmaj aparatoj – iel pensu, decidu, rezonu, interrilatu, finfine agu kiel homo.

Estas necese distingi la du tipojn de AI: la malfortan kaj la fortan. La malforta AI estas la ordinara, kiun ĉiutage ni uzas, aktive aŭ pasive, vole aŭ ne. Ĝi estas utiliga por organizado kaj esplorado de grandaj kvantoj da datumoj kaj ankaŭ por multaj aliaj taskoj, kies plenumado postulus multege da tempo se ilin devus fari homoj. Unu el la plej gravaj specoj de malforta AI estas la nomata maŝinlernado. Per specialaj algoritmoj kaj daŭra komparado de



situacioj, la maŝino “lernas” kiel decidi en situacioj ne plene aŭ eĉ tute ne antaŭviditaj de la programistoj.

Siavice, la forta AI estas ankoraŭ fikciaĵo, ĉar por ekzisti ĝi dependas de scioj pri la homa menso ankoraŭ ne regataj de la sciencistoj. Kelkaj asertas, ke eblos estigi ĝin per simulado de neŭronaj retoj, tamen aliaj estas skeptikaj pri tio, konsiderante la malfacilecon kompreni kiel naskiĝas la konscio.

Inter la nefakuloj, tio estas la plejmulto da homoj, la opinioj pri AI iras

de espero al timo. Kun espero, oni diras, ke AI plibonigas la vivkvaliton, helpas kuracistojn, plifaciligas lernadon. Oni timas, aliflanke, generadon de misinformoj, perdono de privateco, uzadon fare de trompisto. En la ekstremoj, ĝi estas rigardata kiel estonta solvo de ĉiuj homaj problemoj aŭ kiel ribelonta kreitaĵo, kiu iam superregos la homaron.

La supraĵa scio pri kio estas AI kaj pri ĝia potencialo estas kaŭzo de multaj eraraj konkludoj kaj ankaŭ de duboj pri realaĵoj. Ĉar ne eblas en mallonga artikolo prezenti ĉiujn veraĵojn kaj malveraĵojn rilatajn al AI, ni vidu kelkajn demandojn pri la temo, kies respondoj rivelas ĉu la aserto estas mito aŭ fakto.

1. Ĉu AI kaŭzos malaperon de laborpostenoj?

Estas fakto, ke kelkaj laborpostenoj malaperos, same kiel multaj malaperis pro la industria revolucio. AI estas tute taŭga por anstataŭi homojn, ekzemple, en ripetaj taskoj kaj en prilaborado de datumoj. Tamen ankoraŭ restos multaj el la nunaj profesioj kaj novaj aperos. Kurioze, nuntempe milionoj da homoj estas bezonataj por “nutri” algoritmojn de AI per datumoj. Plie, necesas skipoj da fakuloj pri AI mem, por akceligi ĝian evoluon.

2. Ĉu AI povas plifortigi antaŭjuĝojn?

Bedaŭrinde tio estas fakto. Estante antaŭjuĝa, la programisto de AI povas intence aŭ ne “kontaĝi” la algoritmon per sia aĉa koncepto. Tio povas okazi ankaŭ pro antaŭjuĝa elekto de la datumoj fare de la respondeculoj pri tiu tasko.

3. Ĉu eblas vivi margene de AI?

Ne, krom se ni fariĝus ermito. AI estas ĉie, ene de aparatoj uzataj de ni ĉiutage, en domoj, aŭtomobiloj, hospitaloj, interrete, surstrate, labore ktp.

4. Ĉu AI povas esti uzata kontraŭ homoj?

Jes, same kiel ĝi taŭgas por la bono. En la tuta mondo trompisto uzas AI por fari kibernetikajn krimojn, per ĝi eblas krei armilojn ankoraŭ ne imageblajn por murdi malamikojn ktp. Fakte homoj povas uzi AI kontraŭ aliaj homoj.

5. Ĉu AI povas fari sciencajn malkovrojn?

AI estas bonega ilo por plue esplori tion, kion ni jam scias, sed ĝi ne havas la kapablon pensi pri afero tute nova, neniam pripensita.

Tiu lasta demando kondukas al malsamopiniado ekzistanta inter





Steve Wozniak

adeptoj de forta AI, laŭ kiuj eblas reprodukti ĉiujn funkciojn de la homa cerbo, kaj tiuj, kiuj diras, ke tio ne eblas.

Steve Wozniak, kunfondinto de la firmao Apple, kaj Roger Penrose, matematika fizikisto, scienca filozofo, Nobel-premiito pri fiziko, estas du plej eminentaj pensuloj, kiuj dubas pri la ebleco krei maŝinojn kapablajn pensi racie kaj senti emociojn.

Laŭ iliaj opinioj, la maŝinoj ne lernas la konceptojn, kiujn ni provas instrui. Ili nur lernas ŝparvojojn por la ĝustaj respondoj. Sciencistoj scias, kiuj cerbaj regionoj estas aktivigitaj, kiam oni sentas ĝojon aŭ timon, ekzemple, kaj povas vidi la elektrajn ondojn pafitajn, kiam oni pensas pri iu vorto. Sed tio ne helpas la sciencistojn kompreni kiel tiuj fizikaj fenomenoj generas konscion, kaj kiel la konscio produktas rezonadon.

Roger Penrose atentigas pri la plastececo de la homa cerbo. Sennombra kvanto da neŭronaj ligiloj konstante ŝanĝiĝas kaj do por egali ĝin komputilo

devus havi internan strukturon ŝanĝeblan ĉiumomente. Unu el liaj plej interesaj libroj pri tiu temo – La Nova Menso de la Imperiestro – enhavas plurajn asertojn por konvinki la leganton, ke plej probable la forta AI daŭre restos fikciaĵo, ke la homa menso estas neimitebla.

Liaj diraĵoj, el kiuj sekvas kvar por fini ĉi tiun tekston, baziĝas sur longaj rezonadoj pri matematiko, fiziko, kosmo-logio, biologio, filozofio kaj kompreneble kibernetiko.



Roger Penrose

“Ne eblas ekzisti AI sen homoj.”

“AI estas tiel inteligenta, kiel tiuj, kiuj programas ĝin.”

“Estas neeble instrui al sistemo de AI ion ne sciatan.”

“Ni eĉ ne komprenas, kion ni volas kopii.”

## **José Mauro Progiante**

*(Prelego prezentita en la Kongreso de EASP 2023, en la urbo Mogi das Cruzes)*

# Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler



## Demando

De tempo al tempo oni legas la jenajn frazojn en Esperanto:

*Finite la kurso, li revenis al sia hejmo.*

*Bone pensite, li estas valora homo.*

*Profunde analizante, la politiko ne helpas la landon.*

Ĉu ili estas ĝustaj? Kial?

## Respondo

Ĉiuj tri frazoj ja estas malĝustaj. Tion ĉi Zamenhof klarigis jam antaŭ pli ol cent jaroj per unu el siaj Lingvaj Respondoj:

*Ablativo absoluta estas speciala formo, uzata nur en kelkaj tre malmultaj lingvoj; en Esperanto ĝi ne ekzistas. Kvankam ĝi nenie estis rekte malpermesita, tamen ĝia uzado estus kontraŭ la spirito de nia lingvo. En Esperanto la adverba participo ĉiam rilatas la subjekton de la ĉefa propozicio. Sekve oni*

*povas diri “farinte (= kiam la leono faris) la dividon, la leono diris”; sed oni ne povas diri “la divido estante farita (= kiam la divido estis farita), la leono diris”. Enkonduki la latinan aŭ francan ablativon absolutan (kiu por la plimulto da nacioj prezentus ion nenaturan) ni tute ne bezonas, ĉar ni ĉiam povas ĝin anstataŭigi per formo pli natura. En via frazo (“la reĝo kunvokis siajn konsilistojn, por ke, ĉiu el ili eldirante sian opinion, li povu fari decidon”) ni povas*

(Daŭrigota sur la paĝo 25)

# aktivaj kaj pasivaj lingvoj

En interpretado, estas la koncepto de aktivaj kaj pasivaj lingvoj. La aktivaj (kaj fluaj) estas la lingvoj al kiuj la interpretisto interpretas; la pasivaj (kaj ne necese fluaj) estas la lingvoj el kiuj la interpretisto interpretas.

Io simila okazas en tradukado. Ne estas necese paroli lingvon por povi traduki el ĝi. Sufiĉas havi bonan vortprovizon pasivan kaj serĉi nekonatajn vortojn, krom perfekta kono de la lingvo al kiu la tradukisto tradukas.

Laikaj homoj kaj junaj tradukistoj ĝenerale ne scias, ke estas eble traduki el lingvoj, kiujn la tradukisto ne parolas.

Antaŭ nelonge, en profesia socia retejo, tradukistino esprimis sian surprizon, kiam ŝi eltrovis tion. Tradukisto komprenigis al ŝi, ke iam la tradukistoj ĝenerale konis nur la skribitan lingvon, sed ne la parolatan.

Multajn tradukistojn oni “interjuas” pri kiom da lingvoj ili parolas. Kiam ili respondas, ke estas eble

traduki el lingvoj, kiujn la tradukisto ne parolas, ne ĉiam la interparolanto komprenas la respondon.

Ĉi-tiuj estas ekzemploj de io, kio povas esti evidenta por iuj, sed mistera por aliaj.

## Luís Euclides dos Santos



# Eseoj memore al Ivo Lapenna

*Verko: “Eseoj memore al Ivo Lapenna”*

*Pluraj aŭtoroj.*

*Redaktoro: Carlo Minnaja*

Kiam okazis la skismo en Univerŝala Esperanto-Asocio, kun eliro de la eminenta Ivo Lapenna (kiu en ĝi aktivis dum longa tempo), en la dua duono de la 20-a jarcento, tiam mi estis jam sufiĉe engaĝita Esperantisto. Tamen, mi neniam sukcesis kompreni la kialon de la tuta skandalo. Mi legis pri ia danĝero, ke la movado perdis sian neŭtralecon, aŭ ke la regado de unu sola homo malplaĉas al iuj aliaj, aŭ ke oni devus diversigi la agadojn de UEA, kaj similajn ne tre precizajn klarigojn. Neniu el ili ŝajnis al mi sufiĉa por pravigi tian malbelan kaj damaĝan malpacon en la Esperanta komunumo — cetere de homoj, kiuj ĉiam sin nomis “pacaj batalantoj”.

Tial, de longa tempo mi deziris legi la libron “memore al Ivo Lapenna”, publikigitan post kelkaj jaroj, sub la redaktorado de la fidinda, respektinda



Carlo Minnaja. Interesa kolekto da artikoloj, kiuj iom klarigas la misteron, sed ne tute. En ĝi oni povas legi tre riĉenhavajn biografion kaj analizojn pri la vivo, agado kaj personaj trajtoj de la granda homo. Lia edzino Birthe Lapenna estas unu el la plej gravaj kontribuintoj, per longaj kaj detalaj informoj. Sed ne nur. Multaj aliaj aŭtoroj kontribuis per siaj informoj kaj opinioj pri la valoro de Lapenna en la evoluigo de Esperantokulturo dum granda parto de la 20-a jarcento. Li estis ne nur la konata brila oratoro,



sed ankaŭ akademiano, verkisto, juristo, muzikisto kaj profesoro internacie respektata. Ĉiuj unuanime asertas, ke li estis precipe granda influanto: li povis impresi kaj konduki homojn al bonaj idealoj. Ĉiuj artikoloj en la libro do elstarigas la omaĝaton kiel ian diecan figuron: bela, genia, alloga, talentega, preskaŭ perfekta persono...

Laŭ mia opinio, la plej bona eseo estas tiu, verkita de Marjorie Boulton: “Etaj memoroj pri granda homo”. En ĝi oni povas senti de pli proksime la personecon de Lapenna kiel vera homo, en la ĉiutaga vivo, meze de ĉiutagaj problemoj. Nome, ŝi montris, kiel li agis kiel amiko, ne kiel eminentulo.

Kiel li reagis antaŭ etaj situacioj, foje malkomfortaj, ĉe ordinaraj homoj. Ŝi montris lin kiel homon, kiu sin dediĉis ankaŭ al sensignifaj taskoj kun saĝo kaj toleremo, kaj reagis al elreviĝoj kun alkonformiĝo. Fakte, temas pri teksto de sentema poeto.

Mi fermis la libron kun multe da informoj en la kapo. Temas pri grava fragmento en la historio de Esperanto. Sed mi devas konfesi: mi ankoraŭ ne tute komprenas, kial okazis la skismo en nia verda mondo, kiam Lapenna devis eliri el Universala Esperanto-Asocio.

**Paulo S. Viana**

(Daŭrigo de la paĝo 22)

## Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler

*ja tute bone anstataŭigi la substrekitan esprimon per “kiam ĉiu el ili eldiros sian opinion”, aŭ per la pli mallonga “aŭdinte la opiniojn de ĉiuj”.*

*Respondo 19, La Revuo, 1907, Junio*

Sekve, oni devas refari la cititajn frazojn:

*Fininte la kurson, li revenis al sia hejmo. Aŭ: Post la fino de la kurso, li revenis al sia hejmo.*

*Se bone pensi, li estas valora homo. Aŭ: Post bona pensado, oni vidas, ke li estas valora homo.*

*Laŭ profunda analizo, la politiko ne helpas la landon. Aŭ: Per profunda analizo, oni konkludas, ke la politiko ne helpas la landon.*

Kompreneble, ekzistas aliaj gramatike ĝustaj solvoj por ĉi tiuj frazoj, sed en ĉiuj la adverba participo devas rilati al la subjekto de la ĉefa propozicio.

# Bonveno al la 57a kongreso de ILEI

La kongreso de ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – realiĝos unuafoje en Brazilo. En la nordorienta urbo Masejo (Maceió), de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2024, vi havos la okazon partopreni la 57-an kongreson de ILEI, kies ĉeftemo estos **“Esperanto por justa edukado”**.

Kadre de la kongreso estos ankaŭ Simpozio por profesoroj kaj universitataj studentoj kun la temo: **“Lingvoj de instruado kaj justa edukado”**.

Niaj ILEI-kongresoj estas ne nur por Esperanto-kursgvidantoj, sed por ĉiuj instruistoj de pluraj fakoj. Kaj, ankaŭ homoj de aliaj profesioj kaj okupoj trovos ion interesan por si dum tiuj 7 plenaj tagoj, se ne paroli pri la diversaj programeroj ekster la kongresejo. La urbo estas plena je allogaĵoj: tropika klimato, agrabla temperaturo, muzeoj, eĉ pri futbalo ĉe la “Stadiono Reĝo Pelé”, belaj plaĝoj kun naturaj naĝejoj, promenejoj ĉe la marbordo kun multaj restoracioj kaj trinkejoj.

Dum la evento prelegoj, debatoj, kursoj por komencantoj kaj progresantoj, seminario, artaj vesperoj, ekskursoj por vi kaj por viaj kunvojaĝantoj, kaj aliaj aktivaĵoj regalos vin ĉiujn.

Lingva festivalo estos alia alloga programero, kiam esperantistoj lernigos iom pri siaj lingvoj pere de Esperanto. Poliglotoj povos ĉerpi multon el tiaj agadoj.

Esperanto-asocioj havos budojn por prezenti sin kaj eĉ disvendi esperantaĵojn laŭ la reguloj de la kongreso.

Ĉiuj, kiuj aliĝos ĝis la 31-a de decembro ricevos rabaton de 10 eŭroj en ĉiuj kategorioj. ILEI-membroj pagas malpli, kaj por ne membroj estas granda avantaĝo membriĝi al ILEI, ĉu kun ricevo de 4 paperaj IPR (Internacia Pedagogia Revuo), ĉu kun la reta gazeto. Do profitu la okazon kaj aliĝu tuj al nia kongreso!

Laŭ la regularo, se iu aliĝinto nuligas sian partoprenon antaŭ la 15-a de

junio de la kongresa jaro, la kotizo povas esti transdonita al alia partoprenanto en la sama kategorio, aŭ ILEI redonos 70% de la aliĝkosto.

Maceió jam gastigis du naciajn kaj unu junularan kongresojn (BKE kaj BEJK) en la jaroj 1988 kaj 2004, kaj ankaŭ tri nordorientajn renkontiĝojn. Ni planas okazigi la artajn vesperojn en malfermitaj lokoj por ke neesperantistoj iom sciui pri Esperanto kaj la kongresanoj havu kontakton kun niaj samurbanoj. Ankaŭ estos okazo diskonigi la lingvon en lernejoj kaj universitatoj pro la temo, kiu rilatas al lingvoj kaj edukado.

ILEI lanĉos baldaŭ la oficialan ret-ejon de la 57-a Kongreso kun ĉiuj detaloj: aliĝilo, programo, gastejoj, informoj pri la urbo, k.m.a, sed jam aperas

informoj ĉe (<https://ileienbrazilo.org/57-a-kongreso/>) kaj (<https://eventa.servo.org/e/ILEI-57>). Vizitu ilin kaj montru vian interesiĝon. Vi povas aliĝi al la babilejo ĉe tele-gramo (<https://t.me/Masejo2024>) kaj resti ĉiam informita. Alvoko kaj aliĝilo ĵus aperis en la reta IPR numero 4/2023 paĝoj 52-54.

La kongreso estos hibrida. Tio signifas, ke ni havos programerojn ĉeestajn kaj virtualajn. Do, ni invitas ĉiujn esperantistojn el pluraj mondpartoj.

Bonvolu diskonigi nian kongreson per viaj sociaj retoj. Montru, ke vi konscias pri la grava rolo de la instruado de nia kara lingvo. Kaj kompreneble, aliĝu al ĝi kaj partoprenu efektive, ĉu ĉeeste, ĉu virtuale. Masejo atendas vin!

**Aristóthio Andrade Alves Filho**



## A 3

Scenejo pli perfekta ol tiu de *Kunvivada Centro de Lago Norte*, ekologia parko, certe ne ekzistus. Matene, esperplene, mi eliris por meditpromenado. Melodio enkapiĝadis. Ĝi komponiĝis por la mantrama frazo: *om brahmam shivam*, monotona monosilabo kaj du ritmaj oksitonoj same monotonaj. Kiel konvenas, cetere, al mantramoj.

Iradis mi duontrance laŭ la pado de trankvilaj pasantoj kiam niaj distriĝemaj, scivolemaj rigardoj interkruciĝis kaj reciproke sin subtenis nur sufiĉe por senti sin amikoj. Mi supozebla homo kaj ĝi evidenta birdo sin vestita per brunaj kaj flavaj plumoj. Decidis ĝi akompani min salte, saltete. Ĝi povus flugi, sed ne volis. Flugadis mia imagpovo, anticipante la rakonton verkitan nur du tagojn poste. Promenadis la ĵusaj amikoj, la saltema turdo kaj mi. Disputis ni silente tion, kiu la plej timida. Ĝi tiuokaze avantaĝe: mi etendis du fingrojn kiel memkompreneblan inviton, sed ĝi ne venis sidi. Nur



sin permesis marŝi pli apude al miaj tenis-ŝuoj, kiujn ĝi tutcerte klaĉema observadis.

Iom pli dista, ĉiam ĉe la maldekstra flanko nin kontemplis per vestaĵo verdece blua tiu norda ejo de Lago Paranoao, kiu nin sekvis kaj observis, diskreta kiel monaĥeja gardisto, donacante sunbrilojn al la vegetaĵaro kaj al ni, preterpasantoj, meditantoj, kontemplantoj.

(Daŭrigota sur la paĝo 33)

## Ĉu vi estas esperantisto?

Kial vi estas en la Esperanta Movado? Ĉu vi estas Esperantisto? En Bulonjo-ĉe-Mar, la 5-an de aŭgusto 1905, prelegis L. Zamenhof:... *“Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo; ne kunvenis regnestroj nek ministroj, por ŝanĝi la politikan karton de la mondo, ne brilas luksaj vestoj kaj multego da imponantaj ordenoj en nia salono, ne bruas pafilegoj ĉirkaŭ la modesta domo, en kiu uni troviĝas; sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema: ĝi estas la sonoj de io granda kiu nun naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas; ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova. La fantomoj flugos en la mondon, korpigiĝos kaj potenciĝos, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos.”* (“Kongresaj Paroladoj”, L. Za-

menhof Serio Scio. Volumo 2, 2-a Ed., Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2015, p.5)

Ĉu io ajn ŝanĝiĝis ekde la Zamenhofa tempo ĝis nun? La tempo de Zamenhof estas sama kiel la Jesua tempo: miljaroj! Jesuo diris: “Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron... Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj.” Ambaŭ vidis la estontecon de la Homaro. En la estonto ni vivos frate, inter komprenemaj homoj, kiuj uzos inkluzive Esperanton. Sed ni ankoraŭ devas klopodi por krei la antaŭviditan tempon de Jesuo kaj de Zamenhoj. Sed, kiel ni devos prepari tiun tempon, tiun sacion, tiujn homojn? Tiu memorigas al mi historion de Tolstoj pri tri demandoj de la Imperiestro. Tolstoj ne sciis la nomon de la imperiestro... “Unu tagon, iu imperiestro elpensis ideon, ke se li sciis la respondon al tri demandoj, li certe, neniam perdus sin en iu ajn afero. Kia estas la pli bona horo por fari ĉiajn aferojn? Kiuj homoj estas la plej



gravaj por labori kune? Kia afero estas la plej grava por fari dum ĉiuj momentoj? La regnestro disvastigis dekreton, tra sian regnon, anoncigante ke iu ajn kiu sukcesos respondi la tri demandojn ricevos grandan premion. Multaj homoj legis la dekreton kaj iris tuj al la palaco, kun malsimilaj respondoj.

Respondante al la unua demando iu konsilis imperiestron fari plenan kronogramon de aktivecoj, dediĉante ĉiun horon, tagon, monaton, kaj jaron por certaj taskoj, kaj poste li devus sekvi la kronogramon. Nur, tiel, li povus havi esperon por fari ĉiujn taskojn en la ĝusta tempo. Alia homo respondis ke estis neeble plani antaŭtempe kaj ke la regnestro devus formeti ĉiajn neutilajn amuzaĵojn kaj devus daŭre tute atenti por scii kion fari kaj kiam fari ĉiun aferon. Unu alia insistis ke la imperiestro neniam povus esperi havi la tutan necesan antaŭsciadon kaj kompetentecon por decidi kiam fari ĉiun taskon kaj kion li bezonis fari estis starigi Konsilion de Saĝuloj kaj poste agi laŭ ilia direkto. Aliulo diris ke certaj aferoj devigas tujan decidon kaj ne povus atendi antaŭajn konsultojn, sed se la Imperiestro volus scii anticipe pri la estontaj okazaĵoj, li devus konsulti la magiistojn kaj la profetojn. La respondoj al la dua demando ankaŭ ne sukcesis atingi akordojn. Iu homo diris ke la imperiestro devus fidi plene al la

administrantoj, alia urĝis ke li fidu la pastrojn kaj la monakojn, dum aliuloj rekomendis ke la regnestro fidu la kuracistojn; kaj ankoraŭ aliaj, ke li fidu la militistojn. La tria demando ankaŭ ricevis grandan diversecon de respondoj. Iuj diris ke la Scienco estas la serĉo plej grava. Aliaj insistis ke pli grava estas la Religio. Aliaj asertis ke la grava afero estas la milita kapableco. La imperiestro ne estis kontenta pri la respondoj kaj neniam premio estis donacita. Post multaj noktoj da pripensado, la imperiestro decidis viziti ermiton, kiu vivis sur la supro de monto, kaj estis kiel iluminita homo. La regnestro volis renkonti la ermiton kaj fari la tri demandojn al li, kvankam li sciis, ke la ermito neniam foriras de la montaro kaj estis konata pro tio, ke li akceptas nur malriĉajn homojn, kaj rifuzas iun ajn kontakton kun riĉuloj kaj potenculoj. Do, la imperiestro sin alivestis kiel humila kamparano kaj ordonis al siaj asistantoj, ke ili atendu lin ĉe la malsupro de la monto, dum li sola supreniris la monton serĉante la ermiton. Alveninte en la domon de sankta viro, la imperiestro renkontis la ermiton disfosanta la teron por fari ĝardenon, antaŭ sia domo. Kiam la ermito vidis la vizitanton, li salutis lin, svingante la kapon kaj daŭrigis la laboron. Estis evidente ke la laboro estis dorna por la ermito. Li estis maljuna kaj kiam li metis la fosilon en la teron por enfosi,

li forte bruspiregis. La imperiestro proksimiĝis al li kaj diris: “Mi venis ĉi tien por peti de vi helpon pri respondo al tri demandoj: Kiuj estas la plej bona horo por fari ĉiun aferon? Kiuj homoj estas la plej gravaj por labori kune? Kiu estas la plej bona afero por fari en ĉiuj momentoj? La ermito atente aŭdis, sed li nur amike frapetis sur la ŝultro de la imperiestro kaj daŭre fosis. La imperiestro diris: “Certe vi estas laca. Permesu, ke mi helpu vin”. La ermito dankis, kaj donis la fosilon al la imperiestro, sekve li sidiĝis sur la grundon por ripozi. Post kiam li fosis du terkavaĵojn, la imperiestro haltis kaj turnis sin al la ermito kaj ripetis la tri demandojn. La ermito daŭris nerespondante, kaj, inverse de tio, li levigis, indikis la fosilon kaj diris: “Kial vi ne ripozu nun? Mi povas daŭrigi la laboron denove.” Sed la imperiestro daŭre fosadis. Unu horo pasis, poste pasis pliaj du. Finfine, la suno komencis subiri, malantaŭen de la monto. La imperiestro lasis la fosilon sur la teron kaj diris al la ermito: “Mi venis ĉi tien por demandi vin, ĉu vi povus respondi al mi la tri demandojn. Bonvolu respondi por ke mi povu reveni al mia hejmo.” La ermito levis sian kapon kaj demandis la imperiestron: ”Ĉu vi vidas iun kuranta tie? “La imperiestro turnis sian kapon. Ambaŭ vidis viron kun barbo longa kaj blanka alvenantan el la arbaro. Li kuradis senrege, premante la



manojn sur sanga vundo ĉe sia stomako. La viro kuris direkte al la imperiestro kaj falis senkonscia sur la terenon, kie li kuŝiĝis ĝemante. Malferminte la vestojn de la viro, la imperiestro kaj la ermito vidis ke li estas profunde tranĉilvundita. La imperiestro tute purigis la vundon kaj sekve uzis sian propran ĉemizon por ŝtopi ĝin, sed dum malmultaj minutoj la sango tute malsekigis la ĉemizon. Li tralavis la ĉemizon kaj ŝtopis la vundon duafoje kaj daŭrigis tion ĝis la sango ĉesis flui. Finfine, la vundita viro reakiris la konscion kaj petis iom da akvo por trinki. La imperiestro rapidis ĝis la rivereto kaj revenis kun kruĉo da dolĉa akvo. Dum tiu ĉi tempo la suno mal-

aperis kaj alvenis malvarma nokto. La ermito helpis la imperiestron porti la viron en la kabanon, kie ili kuŝigis lin sur la liton de ermito. La viro fermis la okulojn kaj restis silente. La imperiestro estis lacega, post longa tago suprenirinte la monton kaj fosinte la ĝardenon. Sin apogante en enirejo, li ekdormis. Kiam la imperiestro vekigis la suno jam brilis super la monto. Dum momenteto li forgesis kie li estas kaj kion li faras tie. Li rigardis al la lito kaj vidis la vunditan viron ankaŭ rigardantan konfuzite ĉirkaŭ si. Kiam li vidis la imperiestron, li rigardis fikse kaj poste flustris mallaŭte: “Bonvolu, pardonu min!” “Sed kion vi faris por ke mi pardonu vin?”, demandis la imperiestro.” “Vi ne konas min, Via Reĝa Moŝto, sed mi konas vin. Mi estis malkaŝa malamiko via, kaj promesis venĝi, ĉar dum la lasta milito vi mortigis mian fraton kaj konfiskis mian proprietajon. Kiam mi eksciis ke vi supreniros sola la monton por renkonti la ermiton mi decidis surprizi vin dum la vojo kaj mortigi vin. Sed, post kiam mi atendis vin dum longa tempo, sen via apero, mi rezignis kaj lasi la embuskon. Mi ekiris por kaperi vin. Sed, anstataŭ renkonti vin, mi renkontis viajn asistantojn, kiuj rekonis min kaj ponardis min. Pro bonŝanco mi fuĝis kaj kuris ĝis ĉi tie. Se mi ne sukcesus renkonti vin, certe mi estus mortinta nun. Mi intencis mortigi vin, sed, kontraŭe, vi

savis mian vivon! Mi hontas kaj mi dankegas vin. Se mi vivos mi promesas servi al vi dum mia restanta vivo, kaj mi petos de miaj filoj kaj nepoj fari la samon. Bonvolu doni vian pardonon!” La imperiestro estis ĝojega vidi, ke li sukcesis reamikigi malnovan malamikon tre facile. Li ne nur pardonis la viron sed ankaŭ promesis redoni al li la proprietajon, kaj sendi sian propran kuraciston kaj servistojn por flegi lin ĝis plena kuracado. Post la ordonoj al siaj servistoj kaj asistantoj, ke oni transportu la viron al lia hejmo, la imperiestro revenis por renkonti la ermiton. Antaŭ ol reveni al sia palaco, la imperiestro volis ripeti la tri demandojn lastfoje. Li renkontis la ermiton semanta en la terkavaĵojn, kiujn ili fosis en la lasta tago. La ermito stariĝis kaj rigardis al la imperiestro. “Sed viaj demandoj jam estas responditaj.” “Kiamaniere?” demandis la Imperiestro, perpleksa. “Se hieraŭ vi ne kompatus min pro mia aĝo kaj ne helpadus min fosante tiujn ĉi bedojn, certe vi estus atakita de tiu viro dum via reveno. Do, vi pentus ne resti ĉe mi. Sekve, la momento plej grava estis la momento prepari la bedojn, kaj la homo plej grava estis mi mem, kaj la serĉo plej grava estis helpi min. Poste, kiam la vundita viro kuris ĝis ĉi tie, la momento pli grava estis kiam vi flegadis lin, ĉar se vi ne helpus lin, li mortus, kaj vi perdus la ŝancon reamikigi

kun li. Tiel li estis la plej grava homo, kaj la serĉo plej grava estis zorgi lian vundon. Memoru ke ekzistas nur unu sola grava momento, kiu estas la nuno. La aktuala momento estas la sola momento, sur kiu ni havas regadon. La homo plej grava estas ĉiam tiu, kun kiu vi ĉeestas, kiu estas antaŭ vi, ĉar kiu scias ĉu vi interrilatos kun iu alia, en la estonteco? La serĉo plej grava estas igi feliĉa la homon kiu estas ĉe vi, ĉar nur tio estas la serĉo de la vivo.” (“O Milagre da Atenção Plena” – Thich Nhat

Hanh – Ed. Vozes – 2022, paĝoj 93/99)

Ŝajnas al mi ke la historio de León Tolstoj respondas multajn dubojn de nia Esperanta Movado. Nia labora grupo estas tiuj, kiuj staras antaŭ ni. La momento por labori por Esperanto estas nun! La serĉo plej grava estas kunigo de niaj klopodoj favore al Esperanto!

Kion vi, kara leganto, opinias?

**João Otávio V. Rodrigues**



(Daŭrigo de la paĝo 28)

## El mia ĉiutaga vivo: A3

Rilate la turdon mi ne scias, sed la temo de mia meditado estis, laŭ sugesto de libro de Profesoro Amit, la esploro de la arĥetipo nome tutaĵo. Ho! ĝuste mi, konata pro la fragmentigo de miaj agoj, pensoj, sentoj. Silente kantita, la mantramo montriĝis ĝuste kiel helpo kaj fokuso por la stato de flota perceptado, laŭ la modaleco misfokusa kaj akcidenta. Pro tio, mi supozas, nek la homevitema turdo, nek tiu maliceta homo nutris timon pro tioma proksimo laŭ respektama kaj vaganta kamaradeco.

Supozas mi, ke lago, arboj, turdo jam manifestadis la arĥetipon tutaĵo, ĉar ili silentis pli bone ol mi, fakulo pri mensa bruado. Miaflanke neofito, sekvis mi humila atestanto pri tiu menciita arĥetipo tie en naturo. Espereble naturo kaj mi estu unu. Feliĉo en aero. Miakorpe, miamense, mi eĉ ekvidis ĉi tion sur papero A 3 skizate.

**Paulo P. Nascentes**

Emerita profesoro (UnB/IL), poeto, terapeŭto.